Eduard Ebel,

Ŝvebas neĝ el aer'

tradukita de Joachim Gießner

Ŝvebas neĝ' el aer',
nun ripozas la ter'.
Mondo en brilblanka vest',
ĝoju, ja venos kristfest'.

Varma lum' en la kor',
for ĉagreno kaj plor',
ĉesas de l' viv' la molest',
ĝoju, ja venos kristfest'.

Baldaŭ nokto de l' glor'.
Kaj el ĉielo la ĥor
Sonos en dolĉa majest',
Goju, ja venos kristfest'.

Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL *(Eduardo Ebelo, ∗1839 – †1905) en Esperanton de* JOACHIM GIESSNER *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

MR-012-JG-1 / Arg-99-200 (2012-12-24 16:27:56)

MR-012-JG-1

Eduard Ebel,

Neĝas nun ĉie ĉi

tradukita de Manfredo Ratislavo

Neĝas nun ĉie ĉi,
lagon kovras glaci',
brilas kristnaske arbar'.
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Varma estas la kor',
malaperas dolor',
venas savant' de l' homar'.
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Malleviĝis la sun',
sankta nokt' estas nun,
kantas por ni anĝelar':
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL *(Eduardo Ebelo, ∗1839 – †1905) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-99-199 (2003-12-11 08:30:04)

MR-012-3